

ESTRARKUNSIDO DE MEL PRI LA STATUTO DE UEA

Tial, ke Madrida Esperanto-Liceo estas individua membro de Universala Esperanto-Asocio (UEA), ĝi ricevis leteron pri propono de statut-ŝanĝo, kiu koncernas 20 artikolojn, kaj voĉdonilon por esprimi nian opinion pri tiuj ŝanĝoj. Pliaj detaloj troveblas ĉe: <http://www.esperanto.es/hef/index.php/komenco>.

Por difini la sintenon de MEL pri tiu temo, la estraro de MEL kunsidos la lundon 14an de novembro je la 19,00 horo en la sidejo. Ĝis tiu dato, ni bonvenigas opiniojn de la membroj de MEL, kiuj certe helpos nin atingi la plej trafan decidon. Adresu ĝin al madrid@esperanto.es.

Jam la pasintan 24an de oktobro okazis kolokvo en la sidejo, organizita de Hispana Esperanto-Federacio, kun la kunlaboro de Hispana Esperantista Junulara Societo (HEJS) kaj MEL, en kiu oni pritraktis tiun temon, kaj la diversajn ŝanĝojn proponatajn.

DISKO "ESPERANTO" PREZENTOTA EN MADRIDO POST KELKAJ TAGOJ

Niaj amikoj de la rok-bando Cronómetrobudú konfirmis la prezenton de sia lasta k-disko, kun la nomo "Esperanto", en la koncertejo Moby Dick, de Madrido, la venontan 5an de novembro, je la 21a horo. Inter aliaj kantoj, tie aŭskulteblos "Luna", en kies lasta parto Miguel Fernández deklamos la poemon *Ho, mia kor'*, de Zamenhof.



Enirbiletoj akireblas anticipe, kontraŭ 8€, ĉe: <https://entradium.com/entradas/cronometrobudu-madrid> aŭ ĉe la ĝiĉeto kontraŭ 10 €.

La unua prezento en Hispanio okazis la 1-an de oktobro en Burgoso, ankaŭ kun la partopreno de Miguel.

Kelkaj esperantistoj planas renkontiĝi iom antaŭe, je la 7-a vespere, en proksima picejo "Kilómetros de pizza", situanta ĝuste fronte al la koncertejo (Av. de Brasil, 6)

(La tuta k-disko ĝueblas en YouTube ĉe: <https://www.youtube.com/watch?v=DkVMkTFGSQI>. La kanto *Luna*, kie Miguel deklamas *Ho, mia kor'*, estas la sepa. Alklakante "*mostrar más*", vi trovos i.a. lian esperantigon de la originala teksto de la kanto kaj lian hispanigon de *Ho, mia kor'*).

PREZENTO DE POEZIREVUO

La 15an de novembro okazos en la konata madrida librovendejo La Central (Calle del Postigo de San Martín, 8, apud Plaza de Callao), je la 19a horo, la oficiala prezento de la poezirevuo "Caja de resistencia". Temas pri prestiĝa hispana ret-revuo pri nuntempa soci-kritika poezio, kolektive kaj kunside farata kaj administrata, aperanta du fojojn jare (maje kaj oktobre).

Jam en la unua numero, lanĉita pasintmaje, aperis poemo en Esperanto, kun hispanlingva versio, nomata "2010", kies aŭtoro estas Suso Moinhos, kune kun foto de la verkisto kaj lia biografio, kie oni informas, ĉefe, pri lia laboro kiel Esperanto-verkisto. Ĝus aperis la oktobra (dua) numero de la revuo, kaj ankaŭ ĉi-okaze la juĝkolektivo rigardis aperiginda poemon de esperantisto, nome Miguel Fernández, kiu kontribuis per la poemo "Apostolo de la Ideo", legebla en: <http://cajaderesistencia.cc/caja-de-imprenta/caja1-numero2/fernandez/>.

Al la prezento estis invititaj por deklamo de siaj poemoj kelkaj gepoetoj, kies kontribuoj aperis, ĉu en unu, ĉu en la alia el la du numeroj ĝis nun publikigitaj. Miguel havos la ŝancon legi ne nur sian poemon, sed ankaŭ tiun de Suso Moinhos. Esperantistoj de Madrido kaj de pli-malpli proksimaj urboj kaj vilaĝoj estas petataj ĉeesti tiun poezian eventon, kie Esperanto kaj du el niaj poetoj rolos same digne kaj respektinde kiel aliaj lingvoj kaj, respektive, alilingvaj bardoj.

VIZITIS NIN

La estraro de Hispana Esperanto-Federacio decidis en oktobro ke la venonta Hispana Kongreso de Esperanto disvolviĝos inter la 23-a kaj 25-a de junio 2017 en la aragona urbo Teruelo (Teruel), kun eblaj antaŭ- aŭ post-kongresaj aktivadoj, kiujn oni baldaŭ konkretigos.

Dum la lasta semajno de oktobro vizitis nian urbon, pro laboraj kialoj, Alberto Granados, la ĉeforganizanto de tiu venonta teruela Kongreso. Li profitis la okazon por rendevui kun madridaj esperantistoj, por komenti la unuajn planojn de tiu kongreso, la detalojn pri la organizado kaj programo, kaj por interŝanĝi ideojn.

NOVA RETA KURSO

Post iom longa atendo, la 26-an de oktobro aperis en la reto nova kurso, en la plej sukcesa kompanio kaj retejo por lernado de lingvoj, Duolingo. Temas pri la kurso por lerni Esperanton pere de la hispana lingvo: <https://www.duolingo.com/course/eo/es/>.

Jam dum la pasinta jaro estis kreita la kurso por lerni nian lingvon el la angla, kun tre rimarkinda sukceso: pli ol duona miliono da homoj aliĝis al la kurso kaj eklernis ĝin. Eĉ se aspektas logike ke nur procentaĵo finis la tutan lernadon kaj komencis praktiki la lingvon, la kurso revoluciis grandan parton de nia komunumo, ĉefe en Usono kaj aliaj anglalingvaj landoj. Nun, oni esperas ke io simila povos okazi en Hispanio kaj en la amerikaj landoj. Antaŭ la apero de la kurso, 18.000 homoj aliĝis al la informkampanjo, kaj dum la unuaj kvin tagoj, jam 3.000 homoj komencis la lernadon.



Do, la asocioj kaj kluboj devas preti por informi la interesiĝantojn kaj la homojn finintajn la kurson, trovi la manieron profiti la kurson kaj ĝui la avantaĝojn de la lingvo.

KUNVENOJ KAJ KONTAKTOJ

La kutimaj kunvenoj de MEL plu okazas ĉiulunde post la 18,30. La unuasabata babilado ne okazos en la normala formato, ĉar ĝin anstataŭos la komuna ĉeesto en la koncerto de Cronómetrobudú.

Por esti informitaj pri novaĵoj, vizitu regule la retejon de MEL <http://www.esperanto.es/mel>, kaj la liston http://es.groups.yahoo.com/group/esperanto_madrid/.

En *Fejsbuko* vizitindas la forumo de MEL: <https://www.facebook.com/esperanto.madrid/> aŭ la pli ĝenerala <https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/>. Alia ebleco troviĝas en *Meetup*: <http://www.meetup.com/Madrid-Esperanto-Conoce-aprende-practica-y-disfruta>.

madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

Regulaj kunvenoj lunde je la 18,30 horo en la sidejo

<http://www.esperanto.es/mel/>

madrid@esperanto.es



Redaktas Toño del Barrio

Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com